estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 161 Septembro, 1999

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

# KONTENTIGA KONGRESO EN MIRIGINDA URBO

La 84a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Berlino de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto, 1999. Kaj la kongreso kaj la urbo meritas priskribon. En la ĉi-tiama artikolo mi prezentos al niaj legantoj informon pri nur la kongreso mem. Vi povos trovi mian entuziasman konatigon kun la urbo venontnumere.

Jen la nudaj statistikoj: ĉeestis 2712 homoj el 65 landoj (kaj eĉ ne unu interpretisto inter la verda popolo). Estis elektre inspira momento ĉe la solena inaŭguro dimanĉmatene, kiam la nova Prezidanto de U.E.A., aŭstraliano Kep Enderby (li studis dufoje ĉe la somera kursaro en San-Francisko), antaŭ la atendanta Esperantistaro en la granda Salono Zamenhof, proklamis la kongreson malferma. La fervoraj samideanoj respondis laŭte, marŝtakte, kantante la himnon *La Espero*. Estis nur 8 kanadanoj, kaj la Prezidanto de K.E.A., Ciprian Jauca, salutis nome de Kanado dum la ĉiujara ceremonio, en kiu reprezentanto de ĉiu landasocio alportas kelkajn vortojn al la Universala Kongreso.

Kiel en ĉiuj grandaj kongresoj, estis multaj samtempaj sesioj. Dum kvin tagoj (merkredo estis tago por nur ekskursi) estis 5 ĝis 8 samtempaj aferoj, eĉ ne mencii la libroservon. Oni devis ĉiam elekti el multaj ebloj. Kompreneble, la *leĝo de kongresoj* validis refoje ĉi-jare: „se estas du sesioj kiujn oni absolute devas ĉeesti, ili nepre okazos samtempe". Estis prelegoj de la Kongresa Universitato, konversaciaj rondoj, diskutoj pri la kongresa temo („Tutmondiĝo — ŝancoj por

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

paco?”), seminario pri lingvoj ĉe interreto, Bahaa ĥoro, kunvenoj pri terminologio, Ĉe-kursoj, diskutoj pri virinaj aferoj, okazoj por pridemandi U.E.A. kaj la Akademion, okazo por (internacie) ekzameniĝi pri Esperanto, okazoj por aŭskulti eminentajn verkistojn, kunvenoj de legantoj de diversaj periodaĵoj, klarigo pri la venonta eklipso§, kunvenoj de fakgrupoj (fervojistoj, medicinistoj, sciencistoj, verkistoj, skoltoj, katamantoj, katolikoj, naturalistoj, komercistoj, laboristoj, filozofoj, instruistoj, muzikistoj, juristoj, goo-ludantoj), por mencii nur kelkajn el la frandaĵoj.

Kaj ĉiuvespere estis io por regali nin: interkona vespero, Bahaa dancgrupo, popoldancado, bankedo, popolmuziko (Nataŝa kaj Ĵomart), klasika muziko, kantado, nacia vespero (kulturaj prezentoj), balo, teatro, ktp.


Marjorie Boulton, aparte konata al legantoj de ***Inter Ni***, prelegis pri „Britaj romantikaj poetoj en kontinenta Eŭropo” ĉe la Kongresa Universitato. Ŝi ankaŭ ricevis grandan honoron de U.E.A. konekse kun la eldono de ***Lingva Arto***, jubilea libro omaĝe al ŝi kaj William Auld.


Vizito al la Libroservo estis okul-malfermanta sperto. Mi povis apenaŭ kredi kiom da novaj libroj lastatempe aperis. Kaj mi ne parolas pri faldfolioj kaj libraĉoj, kvankam estas ankaŭ kelke da ili. Estas granda kvanto da bonkvalitaj libroj, bone binditaj kun durkovriloj kaj presitaj por facila legado fare de eĉ maljunaj okuloj. Vere, la verda popolo estas benita pro sia abunda, valora kaj plezurlegebla literaturo. Nun la Libraro Ludovika devas plenumi sian taskon, ĉiam kreski kaj ĝisdatiĝi.

Mi ne povas fini sen almenaŭ vorto pri la kongresejo. Ĝi estis tre granda kun abundaj kunvenĉambroj diversgrandaj. Mi neniam vidis tiom da rulŝtuparoj en unu konstruaĵo. Ĉio estas pura, ĉio funkciis bone. Kaj diversaj helpantoj, ĉu Esperantistaj, ĉu germanlingvaj, ĉiam estis amikemaj kaj helpinklinaj, kaj tio ankaŭ kontribuis al mia kontentsento pri la 84a Universala Kongreso de Esperanto.

— Steĉjo

**§ La 11an de aŭgusto sun-eklipso estis videbla de orienta NordAmeriko, tra Eŭropo, norda Afriko kaj la mez-orientaj landoj ĝis okcidenta Azio kaj Hindio.**





# KANADO ESTAS MODELO POR LA OLIMPIKAJ LUDOJ DE LA JARO 2000

Aŭstralia Diplomato Laŭdas Uzadon de Esperanto en Montrealo

D-ro Ralph Harry, AC, CBE, eksa ambasadoro aŭstralia ĉe la Unuiĝintaj Nacioj, parolante al la Halifaksa Esperanto Grupo la 14-an de aŭgusto 1999, diris ke aŭstraliaj organizantoj de la Ludoj en 2000 serĉis metodojn por emfazi la olimpikajn idealojn de paco kaj amikeco.

Li rememoris ke li laboris kun la Esperanta Asocio de Montrealo en 1976 por faciligi komunikadon inter atletoj kaj vizitantoj per frazlibreto kiu utiligis Esperanton kiel ponton al kelkaj aliaj lingvoj. Tiu laboro sekvis lian agadon en 1971-1972 en Germanio kie, kiel aŭstralia ambasadoro en Bonno, li sugestis kaj verkis frazlibreton por la organizantoj de la Munkenaj Ludoj. En Kalgario oni eldonis similan frazlibreton por la Vintraj Ludoj. La organiza komitato laŭdis la kontribuon de Esperanto.

D-ro Harry diris ke la Aŭstralia Esperanto-Asocio jam kunlaboras kun la Sidneja organizanta komitato, kiu deziras pliigi la reputacion kiun gajnis Aŭstralio pro la organizado de la „Amikaj Ludoj” de 1956. Frazlibreton oni jam prov-verkis, kaj oni ankaŭ esploras aliajn eblecojn por uzi la internacian lingvon ĉe la Olimpika Vilaĝo kaj la diversaj lokoj.

D-ro Harry substrekis ke ĉiujn esperantistojn kiuj venos al Sidnejo kompreneble tutkore bonvenigos kaj helpos la aŭstralian komunumon de esperantistoj.

D-ro Harry diris ke estis utilaj kanadaj kontribuaĵoj ĉe la Universala Kongreso en Berlino de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto. Li laŭdis la precizan analizon de la kongresa temo „Tutmondiĝo — ŝancoj por paco?” Simpozio, kiu inkluzivis ne-esperantistajn lingvajn ekspertojn, pridiskutis la efikon de tutmondiĝo sur etnaj lingvoj. La Kongreso akceptis rezolucion kiu substrekis la rolon de neŭtrala lingvo por faciligi komunikadon en tutmondiĝanta mondo sen lingva super-regado fare de iu ajn ŝtato aŭ korporacio. La rezolucio ankaŭ rememoris la helpon kiun provizis la Esperanto-movado por subteni ekologian sekurecon kaj daŭrigantan disvolviĝon.

Dum la vizito, D-ro Harry kaj lia kunvojaĝantino turistis en Grand Pré, Wolfville kaj Peggy’s Cove krom en la urbocentro de Halifax. Post la vizito ili vojaĝis al Vankuvero, kie D-ro Harry ĉeestis la Universalan Kongreson de 1984, antaŭ sia reveno al Sidnejo, Aŭstralio.

**— Ralph Harry plejparte verkis ĉi tiun artikolon por la loka anglalingva gazetaro, sed oni ne eldonis ĝin.**

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆